Jar-raporto pri la Novjork-oficejo de UEA cxe la UN

Mi ekvolantulis ĉe UNO Novjorko plentempe ekde Aŭgusto 2008. Notinda estas ke la oficeja-konstruaĵo de UEA/Novjorko, konata kiel 777 UN Plaza aŭ kiel Church Center (Preĝeja Centro) havas oficejojn de 40 diversaj religiaj reprezentantoj kaj aliaj internaciaj organizoj. Mi havis kelkaj renkontiĝoj kun Bruce Knotts, el unitara oficejo, kaj Inga, sekretario de kvakera oficejo.

Mi kantis/gitarludis esperante antaŭ pli ol 100 laboristoj ĉe festo jar-fine.

Bona frua kontakto interne de UNO estis kun Peter Schwaiger, vic-estro de delegacio por la Europoa Komisio. Li bone konsilis min partopreni en 3 taga evento en Decembro por fin-celebri la Internacian Jaron de la Lingvo. Mi publike intervenis tie antaŭ 200 homoj en tiuj renkontiĝoj, ekkonis plurajn dipomatojn kaj profesorojn, i.a. Joseph Lo Bianco (Aŭstralio) kiu havis pli fruajn kontaktojn kun E-o kaj esperantistoj.

La Departmento de Publika Informado organizas specialajn renkontiĝoj ĉiu-jaŭde kie NROoj kaj universitatoj sendas ĝis 200 reprezentantoj al la auditoriumo de UNO, konvena por filmoj ankaŭ. Duono de la programoj estas prelegetoj kaj minimume triono de la tempo (ĉirkaŭ horo) estas por demandoj kaj komentoj. Kelkfoje mi demandis demandojn kaj ĉiam persone parolis kun la prelegantoj kaj interŝanĝas personan karton. Tie mi regule parolas de Noema Chaplin, reprezentanto de Servas (Usono). Ĉe speciala enir-tablo mi povis disdoni ĉirkaŭ 400 informilojn pri Esperanto.
www.un.org/dpi/ngosection

Jeffery Huffines, gvidanta bahaano, estras komitato por rilatoj inter NROoj kaj DPI. Mi antaŭvidas regulan kontakton kun li kaj la bahaanoj.

Humphrey Tonkin kaj mi renkontiĝis invitis plurajn esperantistoj
por tag-manĝi por viglaj diskutoj pri la eblecoj ĉe UNO. Inter aliaj UNO, laboristino, Renata Kazcmarska, de Departmento de Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj (DESA) daŭre donas utilajn informojn pri vizitindaj renkontiĝoj.

Mi speciale dankas pro konsiloj de Renato Corsetti kaj Stefano Keller.

Sincere, Nijl Blonstein